Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 11/04/2014 Cent sesdeka eldono 12/04/2014 SENDITA (unua eldono 26/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else



SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisdatigatan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

Estontaj kompetentaj Esperantistoj aŭskultas la retradion ĉiun tagon

http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

http://yourlisten.com/Peranto/kiel-la-interreto-anas-la-homon Ktp ktp --ĝis



La interreto akcelas la pretecon kaj kapablon ĉerpi informojn el diversaj kanaloj samtempe, tuj ordigi ilin kaj strukturigi ilin hierarkie. Usona esploristino nomas tiun novan kognan stilon "hiperatento". Tio sonas bele, sed havas ankaŭ malavantaĝojn. La daŭra kaj tuja reagado kondukas al tio ke oni nur dum mallonga tempo dediĉas sin al certa afero. La tendenco iras en la direkton ke oni konsumas sinsekve pecetojn da informoj kaj faras tion per rapida trakurado. Kompleksaj taskoj kiuj postulas tempon kaj persiston dronas en la inundo de malgrandaj urĝaĵoj.

Sed la informa inundo havas ankaŭ siajn bonajn ecojn: Ĝi akcelas ekzemple la scivolemon. La interreto ofertas la ŝancon esplori ĉiun temon kiun oni trovas interesa dummomente. Ĝi ebligas tujan serĉadon - en tiu momento kiam la demando stariĝas. Kaj tiel ĝi forte akcelas la emon enprofundiĝi en aferojn.

Kaj la interreto kune kun Esperanto ebligas amikiĝon kun homoj el la tuta mondo. Kaj tiu amikeco valoras multe pli ol la amikeco kiun ofertas Fejsbuko. La komuna celo pri la disvastigado de Esperanto postulas kunlaboron kiu povas funkcii je alta grado kiu en la antaŭaj epokoj ne estis imagebla. Pruvon por tio liveras la Esperanta Retradio.

Ni ankoraŭ ne scias ĉu tio estas jam la fino de la socia evoluo kaŭzita de la interreto. Sed almenaŭ por ni esperantistoj tiu evoluo estas optimismiga.

CRI online http://esperanto.cri.cn/ Bona Esperanto Bonaj Programoj



la oficiala lanĉo de Esperanto-TV

ESPERANTO

Esperanto-Domo la 5an de aprilo 2014

Richard kaj Dmitry tostas la Lanĉkunvenon

Esperareble ĝi havos bonan sukceson

20. (la gramatiko de E.) La Voĉoj. C



Pasintajn semajnojn vi rigardis trifoje la saman pentraĵon, sed ĉiufoje en malsama vicordo. Unue vi komencis vidi la viron, kaj tio estis la Aktiva Voĉo. Due vi komencis vidi la hundon, kaj tio estis la Pasiva Voĉo. Kaj trie vi komencis vidi la hundon sed rigardis nur la hundon kaj kio okazis al ŝi, sen vidi kaj sen diri el de kie venis la batoj. Tio estis la Mediala Voĉo.

Do estas la aspektoj, la direktoj, en kiuj vi rigardis okazaĵon, kiuj diferencigas la voĉojn. En la tri kazoj la viro plu nomiĝas la viro kaj la hundo plu nomiĝas la hundo, sed la agoj ne estis tute samaj. Por diferencigi la agojn ni do bezonas tri malsamajn vortojn, kiuj tamen ĉiuj enhavu la agon “bat-”. Oni faras tion nature per sufiksoj, sed ne plu en pluraj eŭropaj lingvoj, kie oni uzas komplikajn kombinaĵojn malpraktikajn.

Esperanto ne estas, aŭ ne estu, komplika kaj malpraktika, kaj do uzas simplajn sufiksojn. Ne tri, sed nur du. La Aktiva Voĉo ne havas Sufikson, do la ago estas “batas”. Por la Mediala Voĉo, tiu en kiu oni vidas kaj diras nur la hundon kaj la ricevadon de iu batado, oni uzas la Sufikson “-iĝ-“, do “la hundo batiĝas” = ricevas nekonatajn batojn.

Por la tria Voĉo: atendu ĝis proksima semajno Marcel Leereveld..

Pasintaj numeroj de 'Aŭstraliaj Esperantistoj'

Sur la **retpaĝo de AEA** http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Estu parto de la Esperanto-historio de en Aŭstralio. Sendu vian novaĵon al AE

SENDU NOVAĴON, FOTOJN DE VIA KLUBO AL LA MONDO

Adelajda Lingva Festivalo http://hss.adelaide.edu.au/linguistics/alf/

Vendredon 16 kaj Sabaton 17 Majo 2014

Jen interesa intervjuo kun kuba esperantisto.

https://www.youtube.com/watch?v=J9qQlYC7tHc#t=879 Amike, Nicole



"Globeto Intervjuas" estas serio de dekkvin-minutaj filmoj de la Esperanta televido "Globeto", kies celo estas paroligi konatajn Esperantistojn, aktivulojn, artistojn, aŭ iun ajn Esperantparolanton kiu havas ion interesan por diri. Ĉi tiu supra epizodo enhavas intervjuon kun la konata kubano, prezidanto de Esperanto-USA, Orlando Raola. Ĝi estis filmita je julio 2013, sed publikigita je aprilo 2014.




Brazila Karnavala Festo en Esperanto

https://www.youtube.com/watch?v=fflsx8SBBkI&feature=player_detailpage

Trovis Roger Springer



vidpunktoj



Kompreni, ke ekzistas diversaj vidpunktoj estas komenco de saĝeco.

Amike Nicole

Informi pri Esperanto



1 milionon da personoj jare ?

Vidu http://brila-aktivulo.com sendis Nicole

Mi spektas la videon de Cyrille Hurstel

Ĉu la knabino estas moda, kiel Esperanto?

Karaj

Longa raporto, sed je la komenco mi vidis tiun foton de virino, kaj serĉis pri kio rilatis. En la unua parto de la raporto estas artikolo pri la uzado de Esperanto kiel reklama lingvo. En longa artikolo estis menciita BMW kiu sendis gratulan mesaĝon por la 125a datreveno de Esperanto. Rigardu la bildon!

Sed mi trovis la respondon al la demando - Ĉu la knabino estas moda, kiel Esperanto


Ŝajnas ke oni devas serĉi per VIMEO sed mi ne havas ĝin

Margaret Chaldecott

……………………………………………………………………………………………………

Ĉu la knabino estas moda, kiel Esperanto?

Antaŭ kelkaj semajnoj Lu Wunsch-Rolshoven informis en Libera Folio pri la prezento de gimnastika spektaklo (*), kiu portis la nomon de Esperanto. En komenco de februaro ni eksciis pri tre simila okazaĵo en Hispanio: karnavala bando partoprenanta en tradiciaj andaluzaj festoj prenis la nomon Esperanto kaj ankaŭ uzas esperantistajn temojn kiel bazon por sia spektaklo (**).



Nun venis simila interesaĵo: en la videoportalo "vimeo.com" ni trovis malgrandan filmeton kun la titolo: "Esperanto Fashion Film":http://vimeo.com/79100169

Por mi ne estas klare, kian rolon havas la surskribo "Esperanto" en la fino de la filmo. La unua penso post la spektado estas: "Ĉu tiu filmo estas propagando de nia movado?" - Malfacile respondi, ĉar oni povas diversmaniere interpreti la titolon de la filmeto: "Esperanto Fashion Film"... - Ĉu Esperanto estas modo? Aŭ la knabino estas moda, kiel Esperanto? Aŭ jen tia estas la Esperanto-modo?

* http://www.liberafolio.org/Members/Lu/esperanto-en-europo-pri-esperanto-artfajrajo-de-gimnastiko-esperanto-turneo-2014-kaj-pensoj-pri-esperantujo

** http://www.liberafolio.org/2014/karnavalantoj-en-hispanio-trovis-la-verdan-stelon

László Szilvási, L.S. fonto: Ret-Info

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Individuaj ricevantoj de Esperanto-elsendaĵoj per la reto kaj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

First name	Family Name	Chan	SY	Grace	Alvarez	John	Massam	Mark	Smith	Robert	Bain
Abid	Afridi	Charles	Stevenson	Graham	Fennell	John	Garvey	Martin	Gray	Roger	Hill
Adam	Olechnowic	Chris	Krageloh	Gregg	Libby	Jonathan	Cooper	Marumi	Smith	Roger	Springer
Adrien	FOLLIN	Chris	Morrow	Gus	Faith	Jonathan	Moylan	Mary	Mills	Ronald	Gates
Alan	Bishop	Christine	Paul	Halinka	Ejsmont	Jorge	Gallegillos-P	Mason	White	Rouan	van Ryn
Alan	Mendelaw itz	Christine	Holliss	Happax	Legomenon	Kam	Lee	Matthew	Maguire	Sandor	Horvath
Alan	Turvey	Claudia	Layton???	Harold	Sĉmitz	Karin	unknown	Max	Wearing	Sandor	Monostori
Alan	Collinson	Colin	Robinson	Hazel	Green	Katarina	Taggart	Michael	LoSordo	Sandra	Connors
Alan	Dean	Crystal	Hill	Heather	Heldzingen	Katja	Steele	Michael	Waters	Shane	Leddin
Amanda	Markham	Cyrille	Hurstel	Helen	Webb	Kay	Andersen	Michael	Zhang	Shayne	Power
Amy	Regal	Dale	McManus	Helen	Palmer	Kehui	Bao	Mick	Gallagher	Shirley	Gradussov
Andre	Samosir	Dan	no name	Henriette	Vanechop	Keith	Bowling	Mike	Leon	Shresta	Kishor
Andrea	Witt	Daniel	Forrest	Henry	Broadbent	Ken	Rolls	Mike	Taggart	Sibel	Lewis
Andrew	Adams	Daniel	Kane	Hermann	Kroppenberg	Kep	Enderby	Mikel	Rizo	Sidney	Wolifson
Andrew	Lutz	Danton	Black	Herve	Diviciacos	Kerry	Robson	Miranda	Lutz	Siu	Chan
Andrew	Maybury	David	Dalgleish	Howard	Gravatt	kevin	kenefick	Morgan	Day	Stephen	Landman
Andrew	Spannenberg	David	Dewar	Huigh	Malcolm	Kevin	Warburton	Nancy	Roy	Stephen	Pitney
Angela	Chin	David	Kidd	Humphrey	Tonkin	Kiah	Morante	Nicole	Else	Steven	Garamy
Angela	Maag	David	Ryan	Ian	McArthur	Kieu Tu	Duong	Nigel	unknown	Svetislav	Kanachki
Anne	Sanders	Dennis	Murphy	Ian	Green	Kirsi	Rossi	Owen	Loneragan	Szilvasi	Laszio
Archana	Joshi	Dianne	Lukes	Ian (Jano)	Wylles	Lauren	Smith	Pamela	Fenton	Teodomiro	Clavis
Arnie	Schaaij	Dianne	Mitchell	Indrani	Beharry-Lall	Laurie	Kirwan	Patricia	Palmer	Terry	Manley
Barbra	Stephen	Dmitri	Lushnikov	Indu	Thapalia	Lenny	g-----b	Patrick	Zhang	Thomas	O'Gliasain
Barbra	Treharne	Donald	Rogers	Ivan	Pivac	Leonie	McGlashan	Paul	Burger	Tiffany	Liu
Barrie	Cledsmith	Doug	Eising	Jaga	Oprzedek	Lev	Lafayette	Paul	Desailly	Tim	Stackpool
Barry	Healy	Duncan	McDonald	Jaiden	Golding	Libby	Farris	Paul	Gorny	Tim	Warren
Benjamin	Hook	Dzejlana	Haveric	James	McElvenny	Linda	Danzer	Paul	Green	Todd	Herbert
Beth	Wearing	Edith	Mejia	Jane	Allen	Linda	Fields	Paulo	Cesar	Trevor	Steele
Beth Maree	Shields	Edna	Watson	Jared	Martin	Ljiljana	Popovic	Peter	Bird	Trish	O'Connor
Bettie	Hart	Eko	Nur Hidayat	Jason	Covell	Louise	Blyton	Peter	Burgoine	UEA	UEA
Betty	Chatterjee	Eleanor	Perno	Jay	Mooney	Luke	Marsillo	Peter	Cummins	Utho	Maier
Bharat	Ghiomire	Elizabeth	Mortimer	Jeff	Cullinan	Lumera	Nohill	Peter	Mitchell	Valencia	Tan
Bill	Starke	Elrae	Adams	Jennifer	Birchall	Marc	James	Peter	Weide	valery	matushkov
Birgitta	Carney	Erhard	Claus	Jenny	Bishop	Marc	Schmidt	Peter	Willshire	Vera	Payne
Blaze	Doric	Erin	McGifford	Jim	Radford	Marcel	Leereveld	Philip	Nichols	Vicky	Crickett
Bob	Felby	Esperanta	Retradio	Jo	Turvey	Marcus	Dohring	Philip	Smart	Volo	Guelting
Bona Volo	Brazilo	Esther	Parris	Joanne	Johns	Marcus	Gabor	Rainer	Kurz	Yaw	Badu
Bradley	McDonald	Finnur	Larusson	Joffre	Bell	Margaret	Chaldecott	rani	lyons	Yvan	Serve
Brendan	Linnane	Franciska	Toubale	John	Abood	Margaret	Yue	Rees	Pearse	Yvan	Serve
Brian	Barker	Francisko	Zilli	John	Adams	Margarita	Pavlova	Renato	Corsetti	Yvonne	Harvey
Brian	Dance	Fujun	Xiao	John	Calder	Maria	Jojkitty	Renjo	Oren		
Brodie	May	Gerry	Phelan	John	Casey	Marika	Fox	Richard	Delamore		
Caitlin	McCluskey	Giles	Thomson	John	Fleming	Marina	Lobanova	Richard	Marcus		
Carol	Lutz	giri	Rao	John	Forbes	Marja	Niesen	Richard	Penman		
Caroline	Turner	Glyn	Truscott	John	Gallagher	Marjorie	Johnson	Robert	Budzul		
Catherine	Chen	Gordon	Coleman	John	Lang	Mark	Pavic	Robert	Hoogenboom		

La noma listo de “Aŭstraliaj Esperantistoj” havas homojn kun konata nomo kaj retadreso

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rogerspringer@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu!

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.
Mi ne aldonas iun ajn retadreson se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rogerspringer@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantistoj" estas uzata krome por sendi Tamen Plu, Telopeon, urĝajn anoncojn kaj se vi deziras, vian bonan ret-gazeton al ĉiuj homoj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj‘ (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.
Skribu al ĉirkaŭ 270 individuaj legantoj, sed en Esperanto, mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne

La novaĵletero ’Aŭstraliaj Esperantistoj’ subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin esti ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekto, oni faras nenion, ĉar la morto atendas vin.
Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo
Filmetoj de Gian Piero Savio **http://vimeo.com/album/2111699**
http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas laŭtlegataj de diversaj personoj
The Simpsons https://www.youtube.com/watch?v=M_77-WMZ1nY

LA ESPERO Esperanta himno Bonega por kunvenoj
Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso

La gastĉambro de EFNSK devas esti antaŭmendita per estontaj gastoj.
Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn, kiuj ne antaŭmendis.
Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la ĝastĉambron.

Interesaj faktoj

Mezura sistemo havas metron logikan facilan sistemon ekde 1795.
Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Ĉu lernanto preferus lerni la metran sistemon aŭ la britan sistemon?

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.
Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).
En Hungario Esperanto estas elektebla lingvo kiel antaŭfako por universitataj studoj. Miloj da gestudentoj ĉiujare lernas Esperanton kaj plejparte poste denove forgesas ĝin, ĉar mankas al ili la kontakto al la lingvo.

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo
Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Uzu Esperantajn literojn **Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ**

Por vindozaj komputiloj. Ek! aŭ Tajpi aŭ vidu sube
Angle http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters,
Esperante : http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters

La epoŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5 minutan aŭskult/legon tage.

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

Rekomendata Legado
"Mirmekobo," de Donald Broadribb www.gazetejo.org/eo/mirmekobo
"Tamen Plu" de Katarina Taggart. Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Telopeo" de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au
Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj
La ĉiutaga eldono Esperanta Retradio retpaĝo por aŭskulti kaj legi Esperanton
http://esperantareradio.blogspot.co.at/

Eĉ la fuŝa studo de la angla faciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj.

La Kluboj. Se la suba kluba informo eraras, ne plendu, informu min.

Roger rogerspringer@tpg.com.au

3ZZZ Radio Melburno http://esperanto-radio.com/3zzzradio

La Manlia Esperanto-Klubo. unua kaj tria Sabato. 10atm Roger Springer 02 9976 0632

La Brisbana Esperanto-Societo Kvara Sabato 1ptm Kay Anderson 07 3372 7006

La Brisbana Esperanto-Kafoklubo Kvara Sabato 3ptm

Esperanto-Grupo de Centra Marbordo Dua Dimanĉo 2ptm

La Tasmania Esperanto- Societo Jaŭde 7ptm

La Melburna Esperanto-Klubo Lunde 6.30ptm

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Vendrede 5ptm

Esperanto-Domo, Sidnejo Tria Dimanĉo 12tm Roger Springer 02 9976 0632

Torkio Esperanto-Kafo-Klubo, – Viktorio Unua Sabato 1ptm 03 5261 2899

Esperanto en Sudaŭstralio The Box Factory, 59 Regent St South, ADELAIDE unua merkredo 08 8242 1460

Adelajda Esperanto-Grupo, Adelajda Esperejo, 81/9 East Tce, ADELAIDE ĉiu sabato 08 8359 3375

Esperanto League of Western Australia Inc. unua kaj tria Sabato (08) 9343 9532.

Esperanto in Australia Meetup group.

ORMARBORDA ESPERANTO-GRUPO
TOOWOOMBA ESPERANTO-SOCIETO
NOVKASTELA ESPERANTO-SOCIETO
SUDORIENTA ESPERANTO-KLUBO

Ne forgesu!

Dro Zamenhof mortis la 14an Aprilo 1917



En 1917 la 14an Aprilo mortis en Varsovio la ne forgesebla kreinto de nia lingvo Dro Zamenhof. La teruraj okazintaĵoj de la milito kaj liaj propraj travivaĵoj plimalbonigis lian sanstaton. Lia jam de kelkaj jaroj kun granda pacienco portita kormalsano finiĝis per la morto. “En la tago pluva, malhela, malvarma la Varsoviaj Esperantistoj akompanis la ĉerkon al tombejo. Al tiu vasta rondo familia, kies delegitoj ĉiujare lin aklamis en kongresoj, la landlimoj restis fermataj. Nur kelkaj poloj, inter ili Grabowski, Belmont kaj la germana ŝipestro Neubart povis diri al li adiaŭon.” (E. Privat, Vivo de Zamenhof.)

Erhard kaj Ness Claus

Mi ricevis ligilon de mia plumamikino de Rusujo.
Ŝia Esperanto teatra grupo faris bonan filmon por Youtube. La titolo estas Filmo Spektaklo Ora Fiŝeto http://www.youtube.com/watch?v=dilhntXmxHg
Eble vi satas ĝin por la Aŭstraliaj Esperantistoj. Amike Dianne Mitchell